




Boletín

nº 411 Julio - Septiembre 2015

19-a Andaluza
Kongreso de Esperanto
"Universitato kaj Esperanto"



de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015
Jerez de la Frontera

Ayuntamiento de Jerez SOLO FIME.L.E.S. aeu

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 411

Redakto-skipto
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio
Vicprezidanto: Ángel Arquillos López
Sekretario: Félix M. Jiménez
Kasisto: Raúl Mtnez. Anguita
Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Juan José Vera
Jesús García Cano

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012

Salutvortoj

Karaj geamikoj,

La monato aŭgusto estis sufoka pro varmo kaj ne nur en Hispanio, ĉar nombra grupo de hispanoj ĉeestis la UK-on en Lillo kaj tie la vetero estis tre simila. En ĉi numero de Boletín vi trovos diversajn artikolojn kaj raportojn kiuj rilatas al la menciita kongreso, kvankam ĉiuj tekstoj diras al ni ion specialan, ĉar temas pri persona sperto de la universala kongreso, afero por multaj malfacile atingebla pro la alta kosto kaj la tempodaŭro.

Kani, Liba Gabalda kaj Eduardo Berdor, kun granda lerteco raportis por ke ĉiuj ni, iamaniere partoprenu la eventon.

En ĉi numero vi ankaŭ scios iomete pli pri la andaluza kongreso okazonta en Jerez de la Frontera, kaj ni ne devas preterpasi la internacian SAT kongreson okazinta en Nitro nek la plej gravan novaĵon, t.e. la diplomo de UEA ricevita de Ana Manero pro ŝia elstara agado kiel kreinto kaj respondeculo de Bitoteko, per kiu ni povas legi bonan literaturon, revuojn kaj ĉiajn librojn, interalie.

Per ĉi kolumno mi profitas la okazon rememorigi al kelkaj legantoj, ke nia bulteno estas ĉies afero, ĉar ĉiuj rajtas kaj ĉiuj devas aktive partopreni por pligrabligi la legadon per anekdotoj, spritaĵoj kaj informoj pri la movado en via urbo aŭ regiono, eĉ pri vi mem, se la afero rilatas al Esperanto. Tio, kion vi ne kuraĝas diri pri vi rekte al aliuloj, ĉi tie vi havas la okazon diri detale kaj kun propra stilo...

Komencas aŭtuno kaj en multaj urboj oni reprenas la studadon de Esperanto, post la aktiva somero, kiun ni profitas por feriado ĉe strandoj kaj multaj aliaj elektas, regionajn, naciajn kaj universalajn kongresojn, kaj por partopreni kongresojn oni devas regi la internacian lingvon. Ĝuu la legadon.

Ángel Arquillos

Enhavtabelo

Salutvortoj	1
Fundación Esperanto en 2015	2
Ankaŭ al hispanio venis premioj de la belartaj konkursoj	3
Pri grupoj kaj Asocio	4
La 100-a UK kaj la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto	7
Aliĝilo por la 75 Hispana Kongreso de Esperanto	9
Mia unua UK!	10
La Centa	13
La 100-a UK en Lillo	15
Mia unua IJK	17
La 88-a SAT Kongreso	19
Mallongaj informoj	21
Esperantistoj honorigitaj	22
Mia sperto pri instruado en mezlernejo	23
La problemo kun Eŭropa Esperanto Unio	25
Poezia Angulo	27
Ana Manero ricevas diplomon pro elstara agado de UEA	28
Diplomo elstara agado de Ana Manero	30

FUNDACIÓN ESPERANTO EN 2015

Fundación Esperanto ankoraŭ ne ricevis petojn koncerne al la nuna jaro 2015.

Tial, ni memorigas la anoncon faritan:

FUNDACIÓN ESPERANTO programis por 2015 helpon por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.



FUNDACIÓN
ESPERANTO

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2015.

Lastatempe, la elspezoj kreskis kaj la enspezoj malpliigis. Tial, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos proksimume 300 €.

Lorenzo Noguero

ANKAŬ AL HISPANIO VENIS PREMIOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ

Dum la Universala Kongreso de Lillo estis anoncigitaj la premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Jen la listo:

POEZIO:

Unua Premio: Mao Zifu pro *Memoro*;

Dua Premio: Jorge Camacho Cordón pro *Kredo*;

Tria Premio: Paulo Sergio Viana pro *Rimoj neperfektaj*;

Honora Mencio: Jorge Camacho Cordón pro *Ĉiu nova persono* kaj Ewa Grochowska pro *Hajkoj*.

Partoprenis 38 verkoj de 19 aŭtoroj el 15 landoj.

PROZO:

Unua Premio: ne aljuĝita;

Dua Premio: Nicola Ruggiero pro *Burĝonos la migdalfloroj*;

Tria Premio: Jesper Jacobsen pro *La tirkesto*.

Partoprenis 22 verkoj de 13 aŭtoroj el 13 landoj.

TEATRAĴOJ:

Unua Premio: ne aljuĝita;

Dua Premio: Nicola Ruggiero pro *Adiaŭ al la suno*;

Tria Premio: Amin Naor pro *Bonaj intencoj*.

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el kvar landoj.

ESEO:

Unua Premio: ne aljuĝita;

Dua Premio: Nicola Ruggiero pro *Pri mondo nokta, pleje mallogika*;

Tria Premio: Davide Astori pro *Lingvoj, valoroj, kulturoj, mondkonceptoj en dialogo*.

Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el du landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO:

Eldonejo Erroteta pro la libro *Usoa venis fluge kaj Sola kaj senvosta* de Patxi Zubizarreta, tradukita de A. Arana.

Partoprenis 4 verkoj de 3 eldonejoj el tri landoj.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ANDALUZIO. Kial vi ne venu al Jerez?

Alproksimiĝas la 19-a Andaluza Kongreso de Andaluzio en la urbo Ŝereo de la Limo (Jerez de la Frontera) kaj mi opinias ke estas bona ideo verki artikolon pri tiu evento kun la celo altiri arte-majn kaj kulturemajn homojn, ĉar Ŝereo estas arto kaj kulturo. En tiu belega urbo oni povas tosti per la plej bongusta vino de Hispanio kaj samtempe aŭdi flamekajn voĉojn en la t.n. "Tabancos", (tipaj trinkejoj de la urbo), ĉar Ŝereo estas lulilo de Flamenka kanto kaj de la mondkonata kaj forpasinta artistino Lola Flores, interalie.



Ĉi urbo havas flughavenon, katedralon, universita-ton, alkazaron, sennombrajn palacojn, monumen-tojn, ktp.

En salono de la deksesa jarcento, ene de la Alkaza-ro, oni okazigos nian eventon. Temas pri malgran-da salono de la palaco de Villavicencio, ĉirkaŭata de ĝardenoj kaj historiaj artaĵoj, kiujn ni ĝuos dum tri neforgeseblaj tagoj.

La temo de la kongreso estas "Universitato kaj Esperanto", do ĝi interesas al ĉiuj universitataj studentoj kaj profesoroj, tamen la eniro estas malfermita al ĉiuj geesperantistoj, ne gravas aĝo nek kulturo, ĉar la evento estas pripensita por ĉiuj, kaj la programo estas diversa kaj eĉ geinfanoj ĝuos belajn filmetojn kaj ludojn.

La urbo Ŝereo estas vaste konata en la tuta mondo,

sed estas necese viziti ĝin por aŭdi la korbatojn de ĝia loĝantaro, flari la odoron de bona vino aŭ belaj rozoj, aŭdi la rompitan voĉon de flamenkulo aŭ miri la magiajn movojn de dancistino. Ŝereo en-volvas nin per sia arto kaj kulturo kaj neniu devus maltrafi tiun ren-devuon.

Reĝa Astronomia Observatorio de S. Fernando



Unu el la plej gravaj ekskursoj estas la vizito al la urbo Kadizo, tre proksima kaj kun grava historio kaj ni ankaŭ vizitos la faman Reĝan Instituton de la Mar-armea Observatorio. Postkongresa ekskurso (decidonta), ni studas al Sanlúcar per barko, kiu transiros la riveron Gvadalkivir kun vizito al Doñana Parko, 2,30 horoj. "Barco Real Fernando".

Kompreneble ne mankos ekskurso tra la urbo piede kaj buse, ĉar la urbodomo invitas al ĉiuj la ĉeestantoj vojaĝi senpage en la turisma buso.

Laŭ mi, la plej interesa estas la vizito al la fama vin-kelo "Real Tesoro Valdespino" kiu estas belega palaco kun grandaj salonoj, muzeo kun originalaj gravuraĵoj kaj de Pablo Picasso kaj de Miró, krom la vastaj keloj plenaj je bareloj de bongustaj vinoj kaj likvoroj. Tie ni ankaŭ ĝuos la t.n. "Yeguada", ĉar Ĝereo ankaŭ famas pro siaj ĉevaloj kaj havas la plej gravan Lernejon pri rajd-arto en la mondo kaj spektaklon pri ĉeval-parado. Ĉio kontraŭ malalta prezo kun gustumado kaj botelo da bongusta vino kun etikedo kiu rilatas al Esperanto kaj al nia 19-a andaluza kongreso. Tio estas belega kaj neforgesebla memoraĵo, ĉu ne?

Ĉu ni havos tempon dum semajnfino? Mi certas ke jes, kvamkam ĉiam eblas reiri trajne kiam ni estos for, buse, aŭtomobile, aviadile, ktp. ĉar Ĝereo ĉiam bonvenigas nin.

Pri hoteloj aŭ pensionoj, la urbo havas malaltajn prezojn kaj sufiĉajn por ĉiuj kaj tre proksimaj de la kongresejo, kiu situas en la urbocentro. Vidu nian paĝaron por pliaj detaloj: <https://andaluziaesperanto.wordpress.com/>

La LKK jam vizitis la urbon en tri okazoj, kaj mi garantias ke ĉi raporteto baziĝas je la sperto kaj neniakaze je poezia fantazio.

Ángel Arquillos



Parto de la korto de la Alkazaro

EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN PINTO



Dum la monato septembro ekspozicio kun la HEF-paneloj pri Esperanto estas montrata en la mezlernejo Mirasur, en la urbo Pinto, sude de Madrido.

Ni memorigas ke la paneloj pretas por ĉiu ajn grupo kaj aktivulo deziranta disvastiĝi nian lingvon en sia urbo, kaj ke la transporto estos pagata de HEF. Ne hezitu kontakti kun la oficejo por koni la detalojn.

MONTARAJ EKSKURSOJ KUN VIZITANTOJ

Dum la someraj monatoj pluraj esperantistaj amikoj el aliaj regionoj de Hispanio kaj el aliaj landoj vizitis Madridon kaj renkontiĝis kun lokaj samideanoj.



Kun multaj el ili ni havis la okazon viziti la urbon, sed oni ankaŭ profitis por koni la naturon de la madrida regiono. En apuda foto oni povas rigardi ripozan momenton de ekskurso en junio kun Bert kaj Janik, respondeculoj de la kultura kastelo Gresiljono.

Alian ekskurson oni organizis en aŭgusto, ĉikaze apud la rivero Lozoya kaj al la pitoreska vilaĝo Patones de Arriba, kun du samideanoj el Ĉinio, sinjoro Nan Youli el Pekino kaj juna amikino Lin Lisha.

LA 100-A UK KAJ LA 75-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La centa UK jam estas historio. Bela kaj memorinda. Neforgesebla por tiuj kiuj havis la ŝancon ĝui ĝin. La centa estis por mi la unua Universala Kongreso, la unuan fojon kiam mi povis vidi kiel pli ol 2.500 homoj venintaj el pli ol 80 landoj de la mondo interkompreniĝas en la sama internacia kaj neŭtrala lingvo, Esperanto.

Observante la aranĝon per infancece feliĉplenaj okuloj mi konstatis, ke "la revo de miljaroj komencas realiĝi". Ekde 1887, jaron post jaro Esperanto manifestiĝas kiel lingvo plene vivkapabla. Ja, ni tute nature ĝuis la eblon povi paroli kaj kompreni iun ajn homon naskitan en iu ajn loko de la terglobo. Oni parolis, legis, prelegis, diskutis, kantis, dancis, manĝis, ekskursis, aĉetadis, koncertis kaj amikumis en Esperanto.

Kaj meze de tiu Esperanta kulturo, meze de tia internacia amikeca etoso, dum la Movada Foiro, brilis modeste la informbudo de la Hispana-Esperanto Federacio. La 25-an de julio inter la 19:00 kaj la 21:00 horo en la granda halo ĉe la interetaĝo de la kongresejo la esperantistoj povis ricevi informojn pri la laboro de la Federacio kaj pri la venonta Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos venontjare en Herrera del Duque, inter la 30a de junio kaj la 4a de julio. Ili povis preni informilojn, revuojn *Boletín*, aliĝilojn, afiŝojn, T-ĉemizojn, librojn (*Donkiĥoto parolas Esperanton*,...) kaj demandi pri io ajn rilate al la disvastigado de Esperanto en Hispanio.

Ĝuste kelkaj minutoj antaŭ la komenco de la Movada Foiro, kelkaj hispanaj esperantistoj tostis kune kun Istvan Ertl je nia sano kaj je la sukceso de la venonta Hispana Kongreso de Esperanto. Ĉu li partoprenos en ĝi? Ĉu Mikaelo Bronŝtejn? Ĉu Gonçalo Neves? Ni vidos.

Estis tre interese rigardi kiel esperantistoj pasas antaŭ la tabloj de la diversaj asocioj, grupoj aŭ movadoj, rigardante informilojn, aliĝilojn, broŝurojn, k.t.p., serĉante ion novan, kio kaptu ilian atenton. Inter 120 informbudoj centoj da homoj serĉas sen scii kion ili trovos.



Iom post iom esperantistoj preterpasis la tablón de la Hispana Federacio, rigardas la revuojn, legas iomete, miras pri la afiŝo de la venonta Hispana Kongreso, demandas ĉu li aŭ ŝi povas preni iun flugfolion, kaj daŭrigas sian promenadon serĉante ion novan.

Kelkaj el ili konas nian vicprezidanton, Ángel Arquillos, kaj parolas amuze kun li.

Je la 21:00 horo la laboro estis finita kaj oni devas lasi la tablon malplena kaj pura.

La esperantistoj malaperas de la granda halo.

En siaj manoj ili havas aliĝilojn por ekstremaduraj esperantaj surprizoj, sed tion ili ne scias.

En siaj manoj ili havas pasporton al lando de limoj kaj kontaktoj, lando de nekonataj naturaj mirindaĵoj sed tion nur malmultaj el ili scias.

Ĉu ili legos dum la Universala Kongreso la informon pri la 75a HEK? Ĉu en siaj hejmoj? Ĉu iuj el ili decidis aliĝi kaj partopreni en ĝi? Kaj vi, kara samideano, ĉu vi jam decidis partopreni en la venonta Hispana Kongreso de Esperanto? Ĉu vi havas proponojn aŭ ideojn? Ĉu vi volas kunlabori aŭ partopreni en la spektaklo *Vivu la teatro!?* Ĉu vi konas la folkloran grupon *Acetre*? Ĉu vi jam vizitis la faman vilaĝon kaj monaĥejon de Guadalupe?

La centa UK estis mirinda jubilea festo por la Esperanta Movado. Kaj ni, hispanaj esperantistoj, havas nian nacian kongreson por festi en nia lando, en niaj regionoj, en niaj urboj kaj vilaĝoj la miraklon de Esperanto.

El Hispanio ni helpas krei pli pacan kaj justan mondon uzante Esperanton. Pere de niaj naciaj kaj regionaj e-kongresoj ni kontribuas al la historio de Esperanto.

Venu al Herrera del Duque, kara samideano!!

Venu al Ekstremaduro.

Aliĝu al la venonta Hispana Kongreso de Esperanto.

Ni daŭrigu la feston!!

Javier Romero Tello

75^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Ekstremaduro: lando de limoj kaj kontaktoj
Extremadura: tierra de fronteras y contactos



Herrera del Duque,
30 junio - 4 julio 2016



www.esperanto.es



FEDERACION
ESPANOLA
DE ESPERANTO

75-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

HERRERA DEL DUQUE,

30-a de junio ĝis 4-a de julio 2016

ALIĜILO

Plenu tiun ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la sidejo de HEF. Oni ankaŭ povas uzi la retadreson kongreso@esperanto.es, aŭ la formularon troveblan en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso/>

PERSONA NOMOFAMILIA(J) NOMO(J).....
 ADRESO
 URBO..... (.....)
 RETADRESO..... TELEFONNUMERO(J).....
 MEMBRO DE HEF: Jes Ne NASKIĜDATO (ne devige, nur por statistiko aŭ rabato)
 DATO DE PAGO⁽¹⁾..... MANIERO DE PAGO.....
 KATEGORIO.....
 KOTIZO.....
 DONACO.....
 SUMO.....

KOTIZOJ

KATEGORIOJ	Aliĝo ĝis la 28-a de februaro 2016	Inter la 1-a de marto kaj la 15-a de majo 2016 ⁽¹⁾	Post la 16-a de majo 2016 kaj surloka aliĝo
Membro de HEF	35€	45€	55€
Ne membro de HEF	45€	55€	65€
Juna membro de HEF (malpli ol 30) ⁽²⁾	25€	35€	45€
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30€	40€	50€

La aliĝo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-1995.
 Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn.

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aligitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2015 kaj aprilo 2016

Bonvolu pagi la kotizon per nia konto ĉe Paypal (admin@esperanto.es) aŭ per enbankigo, nepre indikante la tekston "Kongreso" kaj vian nomon, en la bankokontoj de la "Federación Española de Esperanto":
 TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025 aŭ BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961.

ALIAJ INFORMOJ

DEZIRAS REZERVU GASTIGADON EN JUNULARA REZIDEJO: Jes Ne
 ESTAS INTERESITA PARTOPRENI EN KOMUNA VOJAĜO EL MADRIDO: Jes Ne
 PRETAS PARTOPRENI EN LA PROGRAMO: (aparte menciui proponon)
 PRETAS PARTOPRENI EN LA SPEKTAKLO "VIVU LA TEATRO!": Jes Ne
 KOMENTOJ:

NOTO PRI PERSONAJ INFORMOJ: VIA NOMO KAJ DEVENLOKO APEROS EN RETA LISTO DE ALIĜINTOJ KAJ EN KONGRESLIBRO; VI RAJTAS SUGESTI LA MANIERON SUB KIU ĜI APERU:
 ONI PLANAS HAVIGI LISTON DE NOMOJ KAJ RETADRESOJ AL ĈIUJ KONGRESANOJ, SED VI RAJTAS PETI KE VI NE APERU EN YIU LISTO:
 CETERAJ INFORMOJ ESTOS ARKIVATAJ ĈE HEF KAJ UTILIGATAJ NUR POR INTERNAJ CELOJ

MIA UNUA UK!

Nu, jes, mi ĉeestis mian unuan Universalan Kongreson. Pluraj kialoj pelis min partopreni: ĝi okazis el mondskala vidpunkto tre proksime de mia hejmo, ĝi estis la centa, ĝi okazis en nord-franca urbo kiun mi ne konis malgraŭ tio, ke mi loĝis en proksima belga urbo Mons... Kaj ankaŭ la vojaĝo povus (povis) permesi min viziti denove tiun belgan urbon post 13 jaroj.

Mi ŝatis ĝenerale la tuton. Reveninte, mi havas duecan senton. Unuflanke, mi tre ŝatis la tuton.

La inaŭgura kaj ferma ceremonioj estis interesaj, kaj eĉ iom imponaj. Mi ne suspektis antaŭe, ke mi sentus eĉ emociojn en tiaj solenaĵoj.

Mi alvenis sabaton fruvespere, kaj la amaso da homoj, kiun mi trovis en la Halo estis por mi impona. Dum la unuaj sekundoj, mi ne sciis kion fari, do mi decidis ĉirkaŭiri la halon, haltante de tempo al tempo ĉe budoj kie estis konatuloj/amikoj aŭ kiuj iel interesis min. Mi devas agnoski, ke dum la Malfermo kaj la Fermo mi kantis la himnon, kvankam mi ne estas fervore apostola Esperantisto. Mi pensas, ke mi kantis ĝin ĉar mi ŝatas kanti kaj ĉar mi lasis min preni de la soleno kaj de la momento. Tamen, mi opinias, ke ni ne devus havi himnon ĉar ni ne formas naciecon (verdire, mi ne tro ŝatas la ideon de himno, kvankam muzike la rusa, la franca, la itala, aŭstralia ktp. belas. Sed mi ne tro parolu pri himnoj, kvankam mi memoras, ke mi iam diris al iu, ke la hispana himno ne belas laŭ mi, kaj li responde admonis min kvazaŭ mi estus tre danĝera spiono.

Aliflanke, estis tro da bruo en la Centra Halo. Mi ege bedaŭras, ke oni elektis tiun halon Michaux kiel koncertejon tro ofte. Kompreneble, ne la plej grandaj kaj spektindaj, tamen... Tro da interesaj aferoj samtempis, sed mi komprenas, ke estas maniero dissemi la homojn en malsamajn lokojn kiam la homamaso estas tia.



Fakte, ĉefe tro malmulte da tempo por persone kaj iom profunde paroli kun homoj (novaj kaj malnovajamikoj), kiam oni renkontas jaron post jaro tiom da interesaj homoj. Se estas tiom da homoj, tio estas normala afero. Tiuflanke, tamen, mi ne tro bedaŭras.

Mi kredas, ke mi sukcesis uzi bone la tempon. Mi revidis ĉiujn homojn, kiujn mi volis revidi aŭ persone vidi unufoje (svisojn, japanon, ukraininon...) kaj ekkonis novajn amikojn, jam ekde la unuaj tagoj. Mi jam sciis, sed mi rimarkis, ke uzi naciecon, kvankam ne tro grava en la karaktero de homoj, estas praktika metodo por memori homojn. Almenaŭ mi pasigis multe da tempo kun homoj, kiujn mi ekkonis en la UK kaj kun kiuj pli-malpli iel senkonscie elektis pasigi tempon. Por trovi homojn (aŭ por aliaj uzoj ankaŭ) oni metis mesaĝtabulon ĉe flanko de la ĉefa halo. Tie homoj povis lasi mesaĝetojn sur glu-paperetojn (ankaŭ sennome per la kongresnumero de la specifa kongresano): homoj reciproke gratulis, salutis, klopodis renkontiĝi, eĉ eble flirtis.

Teorie, la lingvaj, edukadaj kaj muzikaj programeroj estas tiuj, kiuj plej altiras min. Sed dum la kongreso mi volis partopreni ĉiujn vesperajn junularajn programerojn (kiuj ne estis aparte riĉaj, sed ja amuzaj kaj plaĉaj) kaj pro tio, mi finis ĉiun tagon tre laca kaj la morgaŭon mi ne povis iri al la plej fruaj prelegoj. Mi ne kapablas kompreni kial mi ne aliĝis al ekskursoj, tamen mi ne iris al granda nombro da prelegoj. Mi ja faris unu viziton: la gvidatan al la trafikaj oficejo de la stacidomo Lille-Flandres, kiu estis interesa. Bedaŭrinde kiam mi rezervis ĝin mi ne sciis, kion mi maltrafos: temis pri la Tago de Lernado. Mi ĉeestis la prelegon pri artikolo de la japana

konstitucio, kiu malpermesas la ekziston de armeo en la lando; pri E@i kaj aliaj retejoj pri lingvo-lernado (ne nur Esperanto); pri la laboro de ILEI; la teatraĵon Ĉagrenegoj... La koncertoj meritas apartan paragrafon:

La nacia vespero estis sufiĉe brila. FaMo estas elstara akordionisto, kiu interpretis kun aliaj muzikantoj kantaĵojn konatajn de la loka publiko sed tradukitaj en Esperanton. Ankaŭ brilis la kantistino de Ĉi ular', adaptiĝo de kanto de Jacques Brel. Post la nacia vespero, la morgaŭon, ni kunkantis ĉe la urbocentra placo la samajn famajn kantaĵojn. Tiu estis por mi unu el la plej ĝuindaj momentoj de UK. Por kongresanoj kaj por la ĝenerala publiko okazis koncertoj de Gijom', JoMo kaj Martin kaj la Talpoj. JoMo estis pli "okcitanema" ol "slavema" aŭ "amuza" do mi ne tiom ĝuis sian koncerton. La Talpoj havis bonegan sonon kaj dancigis la rokemulojn. Aliaj koncertoj estis tiuj de Kajto/Kapriol', Jonny M, Zhou-Mack Fuila, Asorti, Gaetano... Tiu lasta estas profesia muzikisto kiu lernis la



lingvon lastatempe. La alia profesiulo de la UK estis la pianisto Andrej Korobejnikov, kiu mirinde ludis verkojn de Scriabin, Mussorgskij (romantikaj rusaj komponistoj).

Kompreneble, estis libroservo, multe pli granda ol en la landaj kongresoj. Mi faris promeson al mi aĉeti malmulte kaj malpeze, kaj mi pensis, ke mi pli-malpli plenumis ĝin. En tiu libroservo ĉe estis aĉeteblaj T-ĉemizoj.

Mi ne povas paroli pri ekskursoj, ĉar mi aliĝis al neniuj. Nur tiu al Bulonjo-ĉe-Marŝo interesis min iom, pro historiaj kialoj. Ili ŝajnas al mi multekostaj. Por ekstereŭropanoj tio ne tro gravis, ĉar post longa kaj multekosta vojaĝo, elspezi iom pli ne ŝanĝis tro la ĝeneralajn elspezojn.

La plej malagrablaj aferoj estis la ŝteloj, kiuj okazis. En mia hotelo eniris ĉambrojn ŝtelistoj, kiuj malaperigis monon. Same okazis dum la ludado de la unua duono de futbalmatĉo inter la selektitaro de Esperanto, kiu debutis en la UK de Bonaero kaj Okcidenta Saharo. La rezulto de la aĉe interrompita matĉo estis 0-4. Ŝajne, la rivaloj devus esti malpli fortaj venontfoje, se venko estus celo.

Se daŭrigi la saman ideon, mi ne bedaŭras mian sintenon kaj malkapablon pri antaŭplanado (mi ne rimarkis ĝis la hieraŭo, ke merkredo estas libera tago sen programeroj, mi do decidis plene viziti Lillon, kiu devis senti sin iom neglektata post kvar tagoj de kongresumado). Mi multe amuziĝis, renkontis mirindajn homojn, kaj centoj da homoj parolis Esperanton ĉirkaŭ mi (kaj multaj el ili ne parolis denaske mian unuan lingvon, kompare al Hispana Kongreso). Mi ne intencis partopreni alian UKon antaŭ iri al Lillo, sed nun mi pensas, ke eble mi iros al Slovakio, ĉar ĝi estas en Eŭropo kaj en malmultekosta lando, kaj mi amikiĝis al slovakoj. Se iam okazos UK en Montrealo, mi klopodos iri ankaŭ (kaj ŝparos monon antaŭe!), ĉefe ĉar la franca lingvo estas mia unua fako kaj mi ege interesiĝas pri la franca lingvo en Ameriko. Parenteze, inter la homoj, al kiuj mi amikiĝis, estas francdevena montrealano, do jen plia kialo.

Antaŭ la UK mi profitis por revidi Bruselon kaj amikojn kvankam nur dum kelkaj horoj. Post la UK, mi prenis trajnon al Mons, la belga urbo, kiun mi menciis supre. Tie mi ankaŭ tranoktis, sed ĉi-foje ĉe sofsurfantaj gastigantoj (Couchsurfing, la neEsperanta kvazaŭPS retejo). Mi ĝojis esti en Mons: la vetero estis bonega (ne kiel kiam mi loĝis tie aŭtune, vintre aŭ printempe...), estis novaj muzeoj, mi revidis la fasadon de mia tiama "kot" (studenta apartamento en Belgio) kaj la urbo estis bele aranĝita pro tio, ke ĝi estis nomumita "eŭropa kulturĉefurbo". Post la artikolo "Kuriozaĵoj pri Svislando" eble venos alia pri Belgio, kiu riĉas je tio.

Eduardo Berdor



LA CENTA

Ĉi tiu estis mia naŭa UKo. Krome mi partoprenis en multaj SAT-kongresoj, hispanaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. Do, mi povas kompari.

Post la alveno de la 21a jarcento, nome la interreta epoko, la nombro de aliĝintoj en UKoj draste malaltiĝis el nivelo de 2500 partoprenantoj dum la lastaj jardeko kaj duono ĝis Lillo. Certe la magia cifero 100 kaj la proksimeco al Bulonjo kie okazis la unua UKo allogis venantojn kaj nombro de aliĝintoj superis la iaman nivelon.



Resume oni diru, ke la grandeco estas unu el ĉefaj trajtoj de UKoj. Multaj esperantistoj kontentiĝas vidiĝi inter milo (eĉ pli) da samideanoj en granda salonego kaj eĉ laŭ la tuta urbo. Efemera konkero de urbocentro por unu semajno. Ne malgrava atingo de Esperanto.

Tamen tia grandeco estas ankaŭ unu el la malavantaĝoj de UKoj. La plej impona programero kia estas la inaŭguro ne trovas ejon sufiĉe grandan por enhavi la tutan kongresanaron. Tiele nur la invititoj kaj la unuaj alvenintoj ĉirkaŭ 1500 aliĝintoj rajtis eniri en ĝin, dum la resto devis kontentiĝi sekvi la eventon per grandaj ekranoj en aliaj salonoj. Do, mi ĝojis vidi min inter tiom da samuloj, kvankam tiu ĝojo povis esti eĉ multe pli granda. Same okazis ĉe teatraĵoj, prelegoj de famuloj, kursoj ktp. En la plejparto de la okazoj mankis liberaj lokoj kaj ne ĉiuj klopodantoj sukcesis partopreni en tio kion ili deziris.

Ankaŭ ĉe la libroservo (alia grava ero de UKoj) kontrastis sukceso kaj mankoj. Nur en precizaj datoj oni povas konstati en plej komercindustria ĉefurba librovendejo ekzemple FNAC en Madrido tiom fluan lavangon de aĉetantoj, kun diferenco ke ĉe UKo klientoj aĉetas averaĝe ĉirkaŭ kvin aĵojn dum sesio kaj eble ĉirkaŭ dek dum la tuta kongreso. Sciinte tion, UEA eble ne proponas tiom kiom ili povus, kvankam ĉiukaze vere temas pri enorma laboro. Kiu zorgis iel pri libroservo, scias pri kio oni parolas. Tiele la lastan tagon la tabloj estis malplenaj kiel nutrovendejo dum kriza epoko, kaj dume la klientoj plendis pri malabunda propono kaj foje tuja elĉerpiĝo de kelkaj verkoj.

La ĉefa malavantaĝo de UKoj estas ke tro ofte koincidas du aŭ eĉ pli da allogaj programeroj kaj bedaŭrinde oni devas rezigni pri ĉiuj escepte nur unu. Kaj foje kiam oni alvenas tien, oni ne eblas eniri pro manko de spaco, kiel jam oni menciis, aŭ oni devas resti malkomforte en tro plenplena sufoka etoso, stare aŭ surplanke.

En Lillo oni bone zorgis la artan flankon. Abundis teatraĵoj, inter kiuj unu el profesia itala trupo ne esperantista, kiu decidis elekti Esperanton por sursceniĝi enmigrintojn dum la lokanoj parolas itale (kun supertekstoj tradukaj). Alia grava teatraĵo –*Ĉagrenego*– prezentis francecan vodevilon ankaŭ tre profesiece. Abundis ankaŭ koncertoj, sed tamen multaj el ili en granda halo kie anstataŭ akustiko estis bruego pro konstanta preterirado de kongresanoj kaj malbonaj sonkondiĉoj, spite la penon de organizantoj kaj teknikistoj (Flo).

Mi intence kombinas kaj bonaĵojn kaj malbonaĵojn (mi ne parolos pri alta kosto de kotizoj kaj aliaj servoj) por atingi pli mozaikecan skizon. Tiele unu el gravaj emociplenaĵoj estas vidi figurojn aŭ gravulojn de la movado. Ekzemple teatraĵeto pri la kreintino de Bona Espero kun la ĉeesto kaj komento de la menciita, krom simila partopreno de LA nepo, afabla aveto kiu trakuris la tutan kongreson kiel normala kongresano, kvankam en la inaŭguro li jam transdonis la torĉon al sia filino, do ni havos pranepinon; la kompatinda Marjorie Boulton, anoncita kiel preleganto, sed kiu tro atakita de aĝo apenaŭ povis iomete balbuti kun granda kortuŝo de la ĉeestantaro; la ĉiam energia Katalin Kovats, la nebruligebla Hanfri, la afabla Probal Dasgupta kaj tiom multaj aliaj...

Kaj parolante pri famuloj, mi menciui unu aspekton de UKoj, kaj de aliaj Esperanto-kongresoj kiu eble devus esti iomete korektita. Temas pri la tradicia kutimo renomi salonojn omaĝe al gravuloj de la movado. Ĉijare la kongresejo estis moderna konstruaĵo, eble tro moderna por iuj homoj, kun strangaj kubismaj koridoroj kaj ŝtuparoj kabaretece ruĝlumigitaj kiuj konfuzigis la absolute malordan ordon de salonoj. Tio estis tri etaĝoj kun fakte ok niveloj kaj diversaj salonoj en diversaj anguloj (plej ofte tro kaŝitaj) de ĉiu nivelo kun foje diversaj enirejoj en diversaj niveloj. Tro komplika. Krome la kongresejoj kutime jam havas sian propran salonnomaron, sed esperantistoj obstine renomigas la salonojn porkongrese kaj tiele oni baraktas kontraŭ du diversaj nomoj por 12 salonoj, tio estas 24 nomoj de apartaj ejoj, sen enkalkuli la eksterkongresejajn ejojn, vendejojn, manĝejojn, trinkejojn, gastejojn, staciojn necesajn por vivteni sin dum unu semajno en fremda urbo. Do, oni bezonas tri tagojn por bone orientiĝi, la kvaran oni bone moviĝas, sed la kvina estas la lasta kaj la programeroj jam apenaŭ kolizias kaj ne tiom allogas.

Do, resume, bonan sperton. Ankaŭ venontjare la cifero allogos, nome la 101. IJK okazos en Vroclavo, Pollando. SAT-kongreso okazos en esperanta urbo nome Herbergo en Germanio. La hispana kongreso en absolute revolucia maniero en t. n. «Siberio», nome Herrera del Duque. Nur por menciui kelkajn eblojn. Ek al aliĝ'.

Kani



LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO LILLO, DE LA 25-A DE JULIO ĜIS LA 1-A DE AŬGUSTO 2015

Cent dek jaroj pasis de post la unua Universala Kongreso okazinta en Bulonjo-ĉe-Mar. Ĉi-foje oni elektis kiel kongresurbon Lillo en nord-orienta parto de Francio. La kongreso okazis en moderna konstruaĵo *Lille Grand Palais*. Al ĝi enskribiĝis 2689 personoj el 81 landoj de kvin kontinentoj: rekorda nombro de partoprenantoj de UK-oj okazintaj en la 21a jarcento. Informoj pri la evento estis bone disvastigitaj. En la urbo aperis multaj afiŝoj pri la aranĝo kaj pri la publika programo, kiu okazis ĉiutage posttagmeze sur la placo de la Teatro. Prezentiĝis diversaj muzik-grupoj inter kiuj ne mankis JoMo, La Kompanoj, Kapriol', Kajto.

La temo de la kongreso estis: “Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj”. La programo estis varia kaj riĉa kun interesaj prelegoj, diskutoj, debatoj, E-kursoj kaj lingvokursoj, KER-ekzamenoj, filmoj, teatraĵoj, koncertoj, ekspozicioj, spektakloj kaj muzikaj prezentoj. Ĝi montris ampleksan kulturon kreitan de esperantistaro. Libroservo prezentis abundan kaj varian stokon de libroj, T-ĉemizojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis multnombraj programeroj kaj aktivaĵoj. Kunvenis akademianoj, medicinistoj, fervojistoj, ateistoj, spiritistoj, bahaanoj, komunistoj, juristoj, blinduloj, skoltaj, vegetaranoj, komercistoj, matematikistoj, radioamatoroj, nefumantoj, katamantoj, SAT-anoj, legantoj de la revuo *Esperanto*. Plurfoje estis pritraktita la kongresa temo, okazis IKU-prelegoj kaj serio da prelegoj pri Francio, vinseminario, oratora konkurso. Formiĝis internacia koruso sub gvido de Alan Bishop el Aŭstralio.

La poresperanta programo komenciĝis per Movada Foiro. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj aranĝoj dum la UK-oj. Tie sur 120 tabletoj diversaj asocioj prezentis allogan E-materialon kaj informis pri sia agado. Ĝi estas granda renkontiĝejo kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Dimanĉe okazis la Solena Malfermo de la kongreso. Unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj ĝi estis rekte elsendita per interreto. Esperantistoj el pluraj partoj de la mondo povis sekvi ĝin. Kortuŝa estis la salutparolado de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro. La solenaĵon ĉeestis kaj alparolis la publikon ankaŭ la alta protektanto de la 100-a UK, la urbestro de Bulonjo-ĉe-Mar s-ro Frédéric Cuvillier.

La kongresa kuriero *Belfrido* ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto *La Voix du Nord* (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.

Veronika Poór estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA. Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dekdu esperantistoj ricevis diplomon pri elstara agado kaj pri elstara arta agado. Okazis belartaj konkursoj kaj la tradicia aŭkcio, unu el la viglaj kaj ŝatataj programeroj (spektaklo), kiun majstre gvidas jam de kelkaj jaroj Humphrey Tonkin. Koreoj invitis kongresi en la jaro 2017 en Seulo, slovakoj - venontjare en Nitro. Junuloj havis abundajn kaj buntajn programerojn kaj amike amuziĝis. Infanoj ĝuis sian kongreseton. Same kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje okazis futbalmatĉo. Nia teamo konsistanta el entuziasmuloj tamen perdis 4-0 kontraŭ skipo de *Okcidenta Saharo*.

La kongresanoj havis eblon partopreni en diversaj ekskursoj biciklaj kaj busaj al Parizo, Amieno, Arraso, Bruĝo kaj al aliaj lokoj. La plej alloga estis tiu al Bulonjo-ĉe-Mar. Tie oni vizitis la teatron Monsigny, kie okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905. La prezidanto de UEA Mark Fettes citis la tiaman paroladon de Ludoviko Zamenhof. Centoj da esperantistoj paradis tra la stratoj kun afiŝoj kaj flagoj al la monumento de Zamenhof antaŭ la stacidomo kaj poste al la urbodoma akcepto. Tie post la paroladoj la esperantistaro estis regalita per vino, biero, diversaj sukroj kaj manĝaĵetoj. Vespere Guillaume (Guijom') Armide, la franca talenta muzikartisto prelegkoncertis en la bulonja teatro por la ĝenerala publiko, sed bedaŭrinde venis tre malmultaj personoj.



La 1-an de aŭgusto la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis. Dum la tuta semajno akompanis nin la giganto Zamenhof. Oni resumis la semajnan aranĝon, disdonis diplomojn pro la kvadekjara kaj kvindekjara membreco al UEA. Antaŭ la fino prezentiĝis sur la podio infanoj el Infana Kongreseto kaj kantis por la publiko. Gijom' Armide pianludis. Al Ĝenerala Direktoro Osmo Buler estis transdonitaj donacoj pro lia venontjara emeritiĝo. Clay Magalhães dankis kaj disdonis rozojn al ĉiuj LKK-anoj kaj al la helpantoj. Post la transdono de la verda standardo al la reprezentantoj de la LKK en Slovakio, Petro Baláz kaj la urbestro de Nitro sincere invitis la ĉeestantaron al la 101-a UK, okazonta tie venontjare. Laste kaj neatendite por ĉiuj Petro Baláz petis edziĝon al sia pola koramikino Dorotka Rodzianko antaŭ kelkcentoj da spektantoj kaj donacis al ŝi fianĉringon. Fine oni kantis la Esperanto-himnon *La Espero*.

Liba Gabalda

MIA UNUA IJK, 2015 EN WIESBADEN

De Lillo ĝis Wiesbaden karavane tra Amikejo, tiel ekis mia IJK-aventuro. Jes Amikejo, tiu eks-esperantolando ankaŭ nomita Moresnet. Bedaŭrinde krom bona manĝo en bonkosta restoracio konsilita de lokanoj, ni ne havis tempon fari aliecan viziton. La kialo estis ke nia grupo maltrafis la buson kiu nur ĉiuhore ekiris al la urbo. Ni devis do piediri la longan vojon kun pakajoj kaj subsune. Nu, ni ĉiukaze atingis la celon, bone manĝis kiel dirite, kaj pluiris de trajnhaltejo al haltejo senprobleme. Alvenis nia grupeto nokte, kaj feliĉe bonvenigis nin esperantisto kun veturilo sufiĉe granda por enmeti niajn pakajojn kaj alveni buse al la kongresejo, granda junulara gastejo. Atendis min tie koncerto de JoMo kaj malnovaj amikoj de antaŭ du jaroj... tiu estis laciga tago, do sufiĉe frue indis por mi eniri mian tendan dormolokon.



Kion mi ĝuis dum tiuj sekvaj tagoj? Precipe babiladon kun jamaj amikoj kaj amikiĝo kun aliaj novaj. Grava kialo kiu finpuŝis min veni al IJK post altkosta UK, nun kiam ni revivigas la junularan sekcion de HEF, estis ekscii kiel grandaj junularaj aranĝoj aspektas, kion faras TEJO pli bone, kaj rilati kun aktivistoj en la movado landa kaj internacia. Ĉio ĉi feliĉe plenumiĝis.

Sed ni daŭrigu la rakonton: mi ŝatis la distrajn programerojn kaj same kiel eĉ UK mi bedaŭras ke mi ne povis plurobligi min por ĉeesti plurajn okazaĵojn.

Mi lernis de ĉina partopreninto iom praktiki la arton Ĉigongo, mi lernis pri vikipedia tradukado, multe pri fotado danke al Aktivula-Maturiĝo-seminario; eĉ ukelelon mi lernetis ludi, kaj ĝi estis tre interesa, ĉar vere sufiĉas nur lerni kvar akordojn por povi muziki multajn esperantajn kantojn. Mi aŭskultis kaj dancis dum multaj spektakloj en koncertejo laŭ la ritmoj diversaj de Asorti, Martin Wiese, JoMo, Jonny M, Inicialoj DC (mi plej ŝatis tiun ĉi, kun muzikvideoj apude projekciitaj). Malfeliĉe mi ne povas diri ke mi lerte dancis dum tiuj koncertoj ĉar eĉ ne unu el la pluraj klasoj pri dancado mi ĉeestis (kuba, salsa, svingo).



Estis resume multaj programeroj. Kursoj de esperanto, de la germana aŭ itala ne mankis, same kiel tuttagaj ekskursoj ĉe la Rejn-valo (la mia), la urbo Mainz aŭ Wiesbaden mem. Neforgesinda okazaĵo estis la kulinara lingva festivalo kie multaj partoprenantoj pretigis manĝaĵojn sur siaj landaj tabloj kaj ni ĉiuj povis viziti tablon post tablo kaj gustumi diverslandajn tipaĵojn. Mi bone memoros la amuzan familiduelon faritan el ridiga enketo al kongresanoj mem, la karaokean vesperon kie elstaris kaŝitaj kantistoj kun belegaj voĉoj, kaj la Internacian Vesperon. Ne eblis malbone dormi post ĉiunoktaj diskejoj kie laciĝi, kinejo kie side ĝui 15 filmojn (multajn modernajn kaj 3dimensie spekteblajn per disponeblaj okulvitroj) aŭ gufujo kie kandelotose ĝui mallaŭtan konversacion aŭ ripozigajn muzik-spektaklojn.

La plej malfacilan momenton vi kara leganto jam divenas... temas pri la adiaŭoj al amikoj, sed vi oni ne ploras, aŭ nur ete, ĉar baldaŭ oni revidos ilin en venonta renkontiĝo aŭ alimaniere la plimulton en Fejsbuko.

Alejandro Escobedo

LA 88-A SAT-KONGRESO 15-8-2015

Okazis en la slovaka urbo Nitra situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava. La eventon partoprenis pli ol kvindeko da esperantistoj el dek ok landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madagaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.

Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláž. La kongresejo troviĝis en la universitata student-hejmo “Anton Bernolák”. En la akceptejo estis instalitaj tri librosejvoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis aliaj esperantaĵoj por vendado. En apuda ĉambro ni admiris ekspozicion de diversspecaj bildoj.

Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn. La organizanto prezentis skize la programon de la semajno. Dum la kongreso okazis kvar laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato. Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri programo kaj planoj de E@I. Stano Marček prelegis pri fungoj kaj informis pri siaj lernolibroj *Esperanto per rekta metodo*. Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentita de Johan Derks. Kun Peter Baláž oni diskutis pri la temo *Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj*. Estis ellaborita kaj akceptita la Gvidrezolucio, en kiu oni krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro.





Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo. Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis la mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo. Poste ni vizitis sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo. Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn. Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teoceremonio laŭ japana maniero. La dua duontaga ekskurso kondukis nin al

urbo Topolčianky, kie ni vizitis ĉevalojn. Tie oni bredas plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbolo donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio la 24-an de oktobro 2008. La reĝino kontribuas al ties zorgado kaj oni povas rimarki, ke la "reĝa" ĉevalo estas pli bone prizorgata ol la aliaj. Poste ni vizitis burgon de la 15-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Laste ni vizitis la vinproduktejon sen la promesita gustumado.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la historia urbo en meza Slovakio Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento. Unue ni vizitis la mineralogian ekspozicion kun multegaj, diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj. Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, mantelo kaj lanterno ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo imagante la pezan laboron de tiamaj ministoj. La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo *Banskoštiavnicky Betlehem*, kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.

Vesperaj kulturaj programeroj konsistis el prezento de slovakaj popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj "Civitano 4" kaj "Ni ne plu estu sklavoj". Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo "No problem" el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el



Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj akrobataĵoj. Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.

La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz - La Esperantu-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

Liba Gabalda

MALLONGAJ INFORMOJ

ESPERANTO EN TEKNOLOGIA RETA REVUO

"Hoja de router", la suplemento pri teknologio de la sukcesa reta ĵurnalo "El Diario", publikigis en julio ampleksan artikolon pri Esperanto kaj la influo de la novaj teknologioj en ĝia disvastigo, kun la titolo "La segunda edad dorada del esperanto: WhatsApp, música y un Quijote digital" ("La dua ora epoko de Esperanto: WhatsApp, muziko kaj bita Donkiĥoto"), kun opinioj interalie de la prezidanto de HEF.

Eblas ĝin legi hispanlingve en la adreso http://www.eldiario.es/hojaderouter/internet/esperanto-cursos-internet-redes_sociales-WhatsApp_0_408759487.html kaj en nia Bitoteko.

KAMPANJO PRI KIĤOTO

Fine de septembro, HEF donacis librojn al la biblioteko de la Fakultato de Filologio de la Universitato Adam Mickiewicz de Poznań (Pollando), kiu havas esperantan sekcion. La donacado enkadras sin en la 400-a datreveno de la eldono de la dua parto de la romano "Don Kiĥoto" (1615-2015) kaj konsistis, i.a.: "Don Kiĥoto", "Don Kiĥoto parolas Esperanton", "Tirano Banderas" kaj "Sur la spuroj de Federico García Lorca".



Félix Jiménez, sekretario de HEF, trandonas la librojn al Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj de la UAM en Poznań

ESPERANTISTOJ HONORIGITAJ

Post la ŝanĝo en la registaro de la municipo Castelldefels en Katalunio, la 23-an de julio la novaj aŭtoritatoj decidis nuligi la decidon de la antaŭaj regantoj, ŝanĝi la nomon de la Centra Biblioteko de la urbo. Kiel legantoj de Boletín memoras, la biblioteko havis kiel nomon tiun de Ramón Fernández Jurado, elstara aktivulo, socia, kultura kaj politika, ankaŭ tre engaĝita en la movado por Esperanto. La antaŭaj regantoj, apartenantaj al la Popola Partio, profitis la translokigon de la sidejo, por forigi tiun nomon, kaj lasi ĝin nur por unu salono. Siatempo, estis granda kampanjo en la urbo kontraŭe al la decido, kaj HEF sendis leteron al la urbestro, petante ke oni rekonsideru la decidon.

Fine, la novaj aŭtoritatoj aprobis en sia unua kunsido la reakiron de la nomo honore al nia samideano. Dankon al ili.

La urbo Jerez de la Frontera dediĉos straton al andaluza esperantisto Pedro Naranjo Terán

La 3-an de aprilo 1887-a naskiĝis en Jerezo, Pedro Naranjo Terán. Tiu sama jaro en Bjalistoko, je 3.000 kilometroj el Jerezo, Lazaro Zamenhof, pola kuracisto, diskonigis pere de modesta broŝuro novan lingvon de li kreita kun la celo utili kiel helpa lingvo por la tuta Homaro. Tiu projekto estis unue bone akceptita en Eŭropo kaj poste en la tuta mondo, kaj kvankam tiutempe sen interreto, sen televido kaj sen vacapoj, la ideoj disvastiĝis malrapide, kelkaj jaroj poste esperanto, jen la nomo de la nova lingvo, jam estis idioma parolata de miloj da homoj kaj la geesperantistoj ekrenkontiĝis en kluboj kaj kongresoj naciaj aŭ internaciaj.

Pedro Naranjo lernis aŭtodidakte la novan lingvon, tamen li baldaŭ kontaktis kun la Andaluza Esperanto-Federacio kaj konkrete kun la E-grupo de Sevilo, tie li povis ekbabilu en esperanto ĉefe kun Trinidad Soriano, la elstara sevila arkitekto kaj ĉeforganizanto de la tiutempa andaluza E-movado.

Li lernis tiel rapide la lingvon, ke nur unu jaro poste, en 1918, li jam instruis esperanton al la skolta trupo de Jerezo kaj en tiu sama jaro li partoprenis en la kongresoj organizitaj de la Andaluza Federacio, li fariĝis reprezentanto en Jerezo de la Federacio kaj eĉ apartenis al la estraro.

En la jaro 1924 oni ekeldonis la revuon de la kultura societo “Ateneo de Jerez”, tiam Pedro Naranjo kunlaboris kun ĝi pere de la redaktado de propra paĝo sub la titolo “Notas de un esperantista” (*Notoj de esperantisto*). Pedro Naranjo pritraktis multajn temojn, pri la historio de Jerezo, pri andaluziaj kutimoj, li parolis eĉ pri la vino de Jerezo. Li ankaŭ komentis informojn rilatajn al la disvolviĝo de esperanto en la tuta mondo. Lia korespondado estis tiel abunda, ke baldaŭ ekkunlaboris gesamideanoj de Aŭstralio, Meksikio, Francio... La ekzisto de ĉi tiu sekcio ene de la revuo de tiu kultura societo ankaŭ suliĝis al alia elstara esperantisto, Rafael Fiol Paredes, militista kuracisto naskiĝinta en Ceŭto, kvankam dum tiuj jaroj li loĝis ankaŭ en Jerezo. Rafael Fiol estis vera erudiciulo, li konis perfekte la araban kaj nord-afrikan kulturon kaj li propagandis kaj praktikis esperanton dum sia preskaŭ cent-jara vivo.

La lasta esperantista informo pri Pedro Naranjo Terán estis lia partopreno en la Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Pontevedra en la jaro 1960, tiutempe li ofte ricevis eksterlandajn esperantistajn vizitojn en Jerezo.

MIA SPERTO PRI INSTRUADO EN MEZLERNEJO



kaj ĝi situas en Ejea de los Caballeros, provinco Zaragozo.

La instruisto estis ambaŭokaze Sabino Pelegrín, kiu instruis fizikon kaj ĥemion dumlabortempe.

Post tio, ke mi ekkonis mian horaron kaj en la oktobra "Pilar"-a zaragoza ponto mi kunvokis kunvenon por eblaj interesatoj. Mi unue metis afiŝojn pri la kurso en afiŝlokoj kaj ĉirkaŭ 8 homoj venis. La studentoj apartenis al malsamaj niveloj, de 2-a ESO (13-jaraj) ĝis 1-a bachillerato (17-jaraj). Tio ne estis problemo por la disvolviĝo de la kurso. Ni kune decidis okazigi la kurson ĉiumerkrede dum la unua lernopaŭzo, kiu daŭris malpli ol duonhora.

La unua leciono estis tre sukcesa! Ĉiuj venis kaj amuziĝis per ludo. Temis pri la sekvo: mi printis bildojn de aĵoj kies unua litero estas la Esperantaj literoj: arbo, birdo, citrono... Ne ĉiuj o-vortoj sed ankaŭ kelkaj i-vortoj.

Oni formis du skipojn. Al tiu, kiu trafis la ĝustan bildon, oni aljuĝis poenton kaj oni ritiras la trovan folion. La ludo sekvus ĝis ties fino sed ĝi efektive finis la sonorilo tintiĝis.

Dum la kurso mi uzis materialojn de la lernolibro de Adúriz, de "Esperanto per rekta metodo" de Marček, de la komikso *Salutu la sinjorinon*, de *La eta Spiru'* kaj ankaŭ retajn: videon pri la alfabeto, la (nepran) kanton *Jen* de La Porkoj, la retejojn facila.org kies tekstoj estas pli kompreneblaj por komencantoj, Vikipedion kaj la tieajn artikolojn pri interesaj aferoj por la lernantoj (bedaŭrinde ankoraŭ ne estas artikolo pri Ejea... Unue mi provis

Kiam mi eksciis ke mi instruos en mezlernejo, mi reekhavis la ideon instrui Esperanton. Mi ne lernis la lingvon kiam mi estis mezlerneja studento, sed oni jam instruis Esperanton en tiu edukejo antaŭe dum pluraj jaroj en du etapoj:

la unua antaŭ eble 25 jaroj kaj la dua antaŭ malpli ol 10 jaroj, ankaŭ okaze de projekto AKEL inter eŭropaj lernejoj je kiu mi kunlaboretis. La lernejo nomiĝas Reyes Católicos,



fari la tutan kurson en Esperanto, sed iom post iom mi uzis la hispanan, ĉefe por klarigi gramatikajn trajtojn. Mi estus preferinda fari rondon sed ni devus uzi ordinaran ĉambron kie la studentoj viciĝas kaj rigardas antaŭen al la instruisto sed multe malpli inter ili. Mi klopodis eviti tion krom kiam mi montris videojn sur la ekrano.

La nombro de lernantoj senĉese ŝanĝiĝis pro diversaj kialoj: ili havis ekzamenojn tuj antaŭ aŭ post la paŭzo, eĉ foje dum la paŭzo, aŭ ili havis prelegojn por la tuta lernoklaso pri civitanaj temoj aŭ tutsimple ili laciĝis iom post iom. En februaro amikino de studentino demandis, ĉu ŝi povis eniri la kurson. Mi akceptis nur pro tio, ke ŝi estas brila kaj havis grandan emon. Jam en junio nur 3-4 studentoj venis pro la ekzamenoj. La ekdefebruara studento lernis pli ol aliaj. Bedaŭrinde mi ne plu instruas en tiu mezlernejo ĉi-jare, sed mi intencas teni la rilaton kun la studentoj kaj puŝi ilin al plua lernado.



Kaj vi? Ĉu vi jam instruis? Almenaŭ vi iam estis sendube lernanto de Esperanto. Kia estas via sperto? Bv. sciigi min ĉe kurso@esperanto.es
Dankon

Eduardo Berdor

NOVAJ KURSOJ KOMENCE DE LA AKADEMIA JARO

Komenciĝas la nova akademia jaro, kaj samtempe nova ŝanco lerni Esperanton. Anonciĝis kursoj en diversaj grupoj de la lando, sed HEF ankoraŭ ne havas la kompletan liston. Ni do petas al la organizantoj kaj aktivuloj, ke ili sendu la konkretajn informojn al la adreso de la Federacio, kaj specife al la retadreso kurso@esperanto.es. Relative ofte homoj kontaktas kun HEF por peti informojn, kaj do estas tre konvene konservi liston por helpi en la informado.

Profitante tiun komencon de la kursoj kaj ke la 26-an de septembro ĉiujare estas kunmemorata la Eŭropa Tago de Lingvoj, laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo, en la sidejo ni organizis por tiu tago prelegon pri Esperanto, fare de la instruisto de la madrida kurso, Juan del Castillo, kun enkonduko fare de la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio.



LA PROBLEMO KUN EŬROPA ESPERANTO-UNIO

En pasintaj numeroj de Boletín kaj en lastaj Ĝeneralaj Kunvenoj la Estraro de HEF komentis iufoje pri la malkontento de nia asocio kun la vojo sekvata de Eŭropa Esperanto-Unio, kaj la decido ne pagi nian kotizon por tiu organizaĵo, ĝis kiam ni ne ricevos klarigojn pri ĝia agado, ĉefe en rilato kun la necesa neŭtraleco kiun EEU devus montri kiel tegmenta federacio de laŭstatute neŭtralaj landaj asocioj. Sed ni havas la impreson ke ni ne eksplikis detale la aferon ĝis nun, kaj okaze de nova incidento ni pensis ke indas pli klare komenti al niaj anoj kiuj estas la problemoj kun tiu, kiu devus esti nia voĉo en Eŭropo.

Unue ni devas klarigi ke ni plu pensas ke komuna organizo de la esperantistaj asocioj de la landoj apartenantaj al Eŭropa Unio estas konvena kaj necesa. La suvereneco de la landoj de nia kontinento transiris grandparte al eŭropa nivelo, kaj do alta proporcio de nia esperantista agado povas esti pli facile organizata eŭropskale. Precipe la lobiado ĉirkaŭ la eŭropuniaj instancoj fariĝas nepra, konsiderante la manieron en kiu tiuj institucioj funkcias. Kaj en tiu lobiado EEU faris, ĉefe en la komenco, laŭdindan laboron.

Tamen, EEU faris ion plian jam dekomence, sed pli ofte en la lastaj tempoj: ĝi fariĝis organizaĵo kun propra ideologio, kiu provas propagandi en la esperantista movado ideojn favorajn al certa specifa tipo de eŭropismo, tiu pretendanta ke Eŭropa Unio konstruiĝu sur bazo de identeca ideologio, kontraste al alia vidpunkto pli favora al civitanaj valoroj, aŭ ankoraŭ al alia valoroj kaj ideoj pri Eŭropo kaj eŭropismo.

Tiuj ideoj estis plurfoje prezentataj kaj ellaboritaj de Zlatko Tišljar, la sekretario de EEU kaj redaktoro de ties revuo, *Eŭropa Bulteno*, interalie en sia libro *Eŭropa identeco* kaj aliaj artikoloj. Laŭ li, Eŭropo kreu siajn proprajn valorojn, siajn simbolojn kaj identecon, malsaman al tiu de aliaj mondopartoj, kaj defendante ilin de aliaj popoloj kiuj povas ilin endanĝerigi. Por tio, Esperanto povas havi rolon, ĉar ĝi povas krei alian identecon, kiu fortigus la eŭropan naciismon.

La problemoj ne estas ke Zlatko aŭ iu ajn alia esperantisto defendu tiujn privatajn ideojn, kun kiuj iuj HEF-anoj povas eĉ konsenti, sed ke ili fariĝis la gvidilo por la agado de EEU. La asocio prezentis tiujn ideojn antaŭ politikistoj kaj institucioj. En 2010 ĝi sendis leteron al la Eŭropa Komisiono, kadre de publika konsultado pri la strategio de EU por la nova jardeko 2010-2020, en kiu ĝi esprimiĝis pri la eŭropa identeco, miksante konsiderojn pri religio kaj politiko, pri kiu UEA mem devis atentigi ke ĝi ne kongruas kun la statuta neŭtraleco de la landaj asocioj. Pli poste, ĝi kolektis subskribojn por prezenti popolan iniciaton pledantan por la oficialigo de eŭropa himno, kantata en Esperanto, kaj serĉis aliancinojn por favori tiun ideologion.

Eŭropa Bulteno

Tamen, Hispana Esperanto-Federacio opinias ke tiu ne estas la tasko de EEU. HEF estas laŭstatute neŭtrala koncerne al tiuj kaj aliaj ideoj, eĉ se ĉiuj ni, anoj kaj estraranoj, havas niajn proprajn ideologiojn kaj sociajn, religiajn kaj politikajn, kiujn ni ne estas devagataj kaŝi. Eĉ pli, HEF povas foje kunlabori kun neneŭtralaj homoj kaj asocioj, kun pluralista malfermo, kiam tio povas helpi antaŭenigi niajn celojn. Ni ne postulas izoligon, kaj ni memorigas ke ankaŭ la respekto al bazaj homaj rajtoj estas bazo de nia agado. Sed ni ne povas defendi tiajn specialajn vidpunktojn, kaj ni pensas ke la propraj ideoj de la estraranoj de asocio ne devas influi la agadon de tiu ĉi.

Tiom pli por organizaĵo kiu teorie estas la tegmento de tiaj neŭtralaj asocioj. Ĉiu povas private defendi siajn ideojn por Eŭropo, kaj iuj aktivuloj eĉ fondis politikan partion, Eŭropo-Demokratio-Esperanto, por defendi la rolon de Esperanto en Eŭropo, kiun multaj esperantistoj apogis. La estraranoj de Eŭropa Esperanto-Unio havas rajton defendi siajn ideojn, sed la asocio kiel tia devas resti sendependa de tiuj ideoj.

La lasta ekzemplo pri la baza nekompreneo de EEU rilate al tiu devo pri prudento kaj neŭtraleco estas evidenta en la numero 151, aŭgusta, de *Eŭropa Bulteno*, kiun oni povas legi rete en la adreso <http://www.europo.eu/ge/documentloader.php?id=439&filename=eb-151-2015-08.pdf>. En ĝi, post unua artikolo raportanta pri la Universala Kongreso de Lillo, jam la dua artikolo estas teksto subskribita de Zlatko Tišljarić, sed ne markita kiel opinio, en kiu li priskribas du supozatajn ideologiojn de la esperantismo, tiun sponsoritan de Zamenhof pledantan por unuiĝo de la tuta homaro, kaj alian kiu pledas por Esperanto kiel identeca lingvo de Eŭropo. Oni tie malferme priskribas tiun ĉi lastan ideologion kiel bazan agadpunkton de EEU. Oni atakas la tuthomaran ideologion de la "klasikaj" esperantistoj, kaj preferas ke EEU koncentriĝu al iu eŭropnaciisma ideo ĉar "neniu povas ami same forte ĉiujn homojn de la mondo", sed nur "tiujn membroj de tiuj el la grupoj al kiuj oni apartenas".

Tiu artikolo aperas klare sen indiko ke temas pri persona opinio, en elstara pozicio, eĉ antaŭ raporto pri la agado de EEU en Lillo kaj okazigo de ĝia Asembleo. Post nia peto pri klarigo al la estraro de EEU, la prezidanto de la asocio, Seán Ó Riain, konfirmis ke la estraro de EEU ne diskutis tiun artikolon sed komentis ke la estraro ne havas problemon kun tiu aliro pro praktikaj kialoj, ĉar tio permesas havi pli bonajn rilatojn kun la eŭropaj aŭtoritatoj, ekzemple cele al la akiro de subvencioj. Ni denove koncedas ke Seán kaj Zlatko havas sian rajton defendi siajn ideologiojn, sed EEU kiel asocio ne havas rajton ataki la esperantismon de Zamenhof nek sponsori naciismojn nek identecajn elpensadojn. Ke tio povas helpi en la rilatoj al politikistoj ne povas esti kialo: niaj asocioj devas montri sian propran personecon, kaj ni ne devas subiĝi al la politiko de la institucioj.

Pro tiuj kialoj, jam la antaŭa estraro de HEF decidis haltigi la subvenciadon de la agado de EEU per niaj kotizoj, ĝis kiam ni ricevos klarajn respondojn al niaj plendoj. Tiuj ĉi neniam alvenis, kaj la nova estraro decidis konservi saman decidon. Ni restas en la asocio, ĉar ĝia baza ekzistokialo estas apoginda, sed ĝis kiam ne estos klara konscio ke ĝi devas ŝanĝi sian politikan strategion, ni pensas ke la rimedoj de HEF ne devas esti uzataj por subteni identecajn kaj naciismajn ideologiojn, nek de Eŭropo nek de ajna alia mondoparto.

La Estraro de HEF

POEZIA ANGULO

En Helsinko

Finnvortoj forest-eroditaj
lojalahunde revenas
malalchajmere.

Kor-amikoj novaj, oldaj
nin akompanas, karesas
tempopretere.

Sur la kalma lago de Töölö
familio cigna naĝas
malfru-somere.

Jorge Camacho

alchajmero: (aŭ Alzheimer-malsano) difuza cerba atrofio, kutime okazanta kune kun demenco, normale dum la senileco (*Vikipedio*).

kor-amiko: tre intima amiko (*Kalevala*: “Kara frato, koramiko, kamarado kunkreskinta”). Por persono havanta am(or)rilaton kun alia persono, ofte kun la intenco nupti aŭ vivi pare, mi de jardekoj uzas la neologismon **umiko** (*Ekstremoj*).

La malĝojo

Alvenis ĉi matene la malĝojo
kaj mi salutis ĝin kun granda tim',
ĉar ĝi kulpigis min de stulta krim'
lasante min plorante ĉe la rojo.

Kun ardo preĝas mi tra l'rekta vojo
por doni pliboniĝon al deprim',
ĉar eblas ke mi estas la viktim'
eĉ de l'malbona sort' ĉi lasta fojo.

Mi timas la rigorojn de la vivo
kaj mi preĝos al kompatema Di',
unika garanti-alternativo.

Se mi ne kulpas pro tia defio,
kial devas mi grimpi laŭ dekliv'
kun sole l' akompan' de mia mio?

Ángel Arquillos

ANA MANERO RICEVIS DIPLOMON PRI ELSTARA AGADO DE UEA

En la Solena Fermo de la 100-a Universala Kongreso en Lillo estis anoncitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diploma pri Elstara Agado kaj de Diploma pri Elstara Arta Agado.

Inter ili, Diplomon ĉijare ricevis nia kunasocianino Ana Manero, pro la gvidado de la projekto *Bitoteko* de Hispana Esperanto-Federacio.

Ana estas la respondeculo de la *Biblioteko Juan Régulo Pérez* de HEF ekde komence de la naŭdekaj jaroj. Tiam la ĉefaj taskoj estis kreskigi kaj katalogi la kolekton kaj mastrumi la stakejon. En 2008 ŝi ekuzis la liberan bibliotekan programon Openbiblio por enretigi la bibliotekan katalogon. Tiel HEF pioniris prizorgadon de E-biblioteko per profesiecaj rimedoj.



Kadre de sia biblioteka agado, ŝi lanĉis kaj kun Miguel Ángel Sancho kunordigas la projekton *Bitoteko*. Bitoteko estas projekto de HEF kiel cifereca biblioteko, muzeo kaj arkivo. Ĝi entenas librojn, artikolojn, muzikajn pecojn, videojn, ktp, en bita formo, konsulteblajn libere por faciligi la aliron de la uzantoj al niaj dokumentoj kaj konservi nian komunan kulturalan heredaĵon. Ĝia baza adreso estas <http://bitoteko.esperanto.es/>

Danke al ŝiaj klopodoj ĉe la Hispana Ministerio pri Kulturo, estis atingite ke la Bitoteko de HEF iĝu parto de la bitdeponejoj *Hispana* kaj *Europeana*.

HEF ĝojas ke UEA iel rekonas, samtempe kun Ana, la projekton kaj ankaŭ la laboron de la ceteraj kunlaborantoj, por havigi al la tutmondaj samideanoj kaj al esploristoj aliron al materialo grava kulture kaj historie. Ĉiu ajn kiu deziras kunlabori, el ajna lando aŭ asocio, estas bonvena kontakti kun HEF.

La Diplomoj pri Elstara Agado estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007, kaj el 2010 ekzistas ankaŭ Diplomo pri Elstara Arta Agado. En pasintaj jaroj du aliaj aktivuloj el Hispanio ricevis tiun Diplomon: Augusto Casquero en 2011 kaj Jorge Camacho (Diplomo pri Elstara Arta Agado) en 2013.

La ceteraj ĉi-jaraj distingitoj estis:

Diplomo pri Elstara Agado:

Richard DELAMORE (Aŭstralio) pro la realigo de la reta Esperanto-Televido
DOI Chieko (Japanio) pro longtempa redaktado de "Esperanto en Azio"
Ilona KOUTNY (Pollando) pro la gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato A. Mickiewicz en Poznano
Birthe LAPENNA (Danio) pro konservo de la la materialoj pri la Montevidea rezolucio k.a. dokumentoj de Ivo Lapenna ĉe la Dana Ŝtata Arkivo
Ĵak LE PUIL (Francio) pro la eldonado de la revuo "La KancerKliniko" ekde 1976
Chuck SMITH (Germanio) pro la realigo de la Esperanto-kurso en Duolingo
László SZILVÁSI (Hungario) pro informa kaj ĵurnalisma Esperanto-agado
Francisco L. VEUTHEY (Nederlando) pro la realigo de 75 filmoj por la Reta Kinejo de UEA
Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia pro la organizado de Esperanta Filmfestivalo.

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Rogener PAVINSKI (Brazilo) pro kontribuado al la muzika E-kulturo
WANG Chongfang (Ĉinio) pro esperantigado de ĉina literaturo kaj pro vortara laboro

Toño del Barrio



DIPLOMO PRO ELSTARA AGADO AL ANA MANERO

Jam de mia konatiĝo kun Ana Manero, en 1991, evidentis al mi, ke mi troviĝas antaŭ aparta homo pro ŝiaj multaj kaj altaj kvalitoj. Inteligenta, sentiva, klara, progresema, velurvoĉa, bela... Feliĉe mi sukcesis engaĝi ŝin kiel surscenejan partnerinon en prezentadoj de *La profil' de viaj spuroj*. Temis pri lirika-muzika spektaklo, kun originala muziko de Pedro Vilarroig, kreita kiel propono de kunfando de diversaj esprimrimedoj en poezian tuton. En ĝi partoprenis deklamantoj, gitaristo, ĥoro, solistoj kaj orkestro. Mi estis la aŭtoro de la tekstoj, kiuj poste konstituis parton de mia kontribuo al la kvaropa poemaro *Ibere libere*. Ĉi tiu, kiel multaj el vi scias, markis la naskiĝon de io, kio poste estis nomata Ibera Skolo.

La sursceneja ĉeesto de Ana Manero ĉiam estis rigardata vera luksaĵo kaj unu el la elementoj, kiuj grave kontribuis al la sukceso de la prezentadoj. El ili ĉiuj, plej memorindas tiu efektivigita en Palau de la Música de Valencio, kuntekste de la tie okazinta 78a UK, en 1993.

En 2012, kadre de la 71a HEF-Kongreso, mi konceptis alispecan spektaklon por priomaĝi la teatron en la urbo Almagro, sidejo de la ĉiujare organizata Internacia Festivalo de Klasika Teatro. Mi alvokis ĉiujn artamajn gekongresanojn al partopreno –ĉu kante, ĉu mime, ĉu lude, ĉu deklame...– en kolektiva prezentado, nomata *Vivu la teatro!*, kunmetita surbaze de ĉiuj ĉi eroj. Mi kreis rakontan fadenon, kiu kunligis ilin ĉiujn, kaj prezentis ĝin kun la partnereco de Ana. La ideo estis tiel bone akceptita de la publiko, ke ekde tiam realiĝis jam pluraj okazigoj de *Vivu la teatro!* kiel programero de naciaj kongresoj de HEF kaj de internaciaj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Kaj en ili ĉiuj la spektantaro ĉiam elstarigis la elegantan ĉeeston kaj fajnkvalitan agadon de Ana Manero.

Sed, krom sursceneja partnerino, Ana estas ankaŭ literatura kunulino. En 2003, ŝi kunordigis la dum unu jaro sekrete preparatan bitlibron *La deka logo*, per kiu ni, kamaradoj kaj amikoj de Liven Dek, surprizis lin priomaĝante lian figuron. Ĉi-libre Ana partoprenis kiel aŭtorino de la mikronovelo *Tro maldare* kaj evidentiĝis unu plia membro de la t.n. Ibera Skolo pro siaj lingvaj uzoj kaj rakonta tekniko. Ŝiaj artikoloj en diversaj E-revuoj, kiel *Boletín*, *Esperanto* kaj *Beletra Almako*, konfirmis ŝin aprecinda E-verkistino. Ŝia studo *La glora parentezo*, aperinta en ĉi lasta publikaĵo (n-ro 14, junio 2012, de *Beletra Almanako*), eminente pruvus ŝian eseistan talenton. Ĝi traktas la rolon de la virino en epoko orbitanta ĉirkaŭ la Dua Hispana Respubliko. Min aparte ĝojigas ĉi laboro, kiun mi mem jam antaŭe petis de ŝi por aldoni ĝin al mia preparata granda antologio pri la Generacio de 1927. Jen kelkaj el la enkondukaj vortoj, per kiuj la redakcio de tiu revuo prezentis la eseon de Ana:

«La ĉi-sekva eseo de Ana Manero, ŝia persona respondo al la alvoko kontribui al la verko de Fernández, prezentas la situacion kaj viv-itineron de la plej gravaj politikistinoj, verkistinoj kaj alispecaj artistinoj tiuepokaj».



Sed, plie, Manero flegas, krom la Biblioteko Juan Régulo de HEF, la plenan disvolvon de projekto fascina por homoj, kiuj emas al studo de la literaturo, la historio, la diversaj soroj kaj soboj de niaj lingvo kaj movado laŭlonge de la jaroj, la aktualaj eĥoj de niaj ekzisto kaj agado... Temas pri la Projekto Bitoteko, mirinda propono krei bitdeponejon de ĉiuspecaj esperantaj dokumentoj kaj meti ĝin je dispono de la ret-uzantaro. La revo por multaj el ni. La revo jam nun grandparte realiĝinta. La revo, pro kiu, kadre de la pasinta 100a UK, en Lillo, UEA aljuĝis al Ana Manero Diplomon pri Elstara Agado. Laŭvorte, “pro la gvidado de la Projekto Bitoteko de Hispana E-Federacio”.

Min tute ne surprizas, ke nia Ana Manero ricevis internacian agnoskon, ĉar jam de longe mi scias, ke ŝi meritas ĝin. Sed mi ĝojas pri tio kaj pri la fakto, ke la fiero, kiun mi kaj multaj aliaj kunuloj kaj amikoj ŝiaj sentis pri ŝi, de nun ĝeneraliĝos al la tuta hispana esperantistaro.

Ana, mi certas, ke ĉiuj ĉi merititaj laŭdoj malkomfortigos vian modestecon. Sed indulgu min. Mi ne povis bridi mian entuziasmon. Krome, mi prisilentis pliajn kvalitojn viajn. Ekzemple, mi nenion diris pri tio, ke vi estas elstara pentristino.

Jen, adiaŭe, mia poemo *Tri tulipoj por Ana Manero*, kiu aperis en la omaĝa parto de mia poemaro *El miaj sonoraj soloj* (IEM [Internacia Esperanto-Muzeo], Vieno, 1996):

TRI TULIPOJ POR ANA MANERO

*Por vi, Ana, sursceneja partnerino,
kiu metas stelpulvoron sur miajn vortojn*

Ana, pluas
sama tuliptapiŝo surĝardene,
samaj veneroj staras
kolone ĉe la vaskoj,
kariatidas laŭbe kaj balustre,
kaj sama okulpar' aŭ la libero
gagatas en la centro
de ĉi perfekto mola –tamen kaŝa
por via kor'–, senmova kaj neebla.

*Nin ĉirpeto de atendo
klarokuren elrodigas
el kuliso.
Ni sargasas rigardmare,
dum etero scena smirgas
vian timon.*

Ĉio samas,
ĉar vi, sintez' de ĉiuj miaj nimfoj,
loĝadas, kiel ili,
en la moment' mirinda
antaŭa –tuja– al la viv-eksplodo,
en la tulipo kosma de la Amo.
Amo ĉe vi sufuzas,
Ana Manero: A.M., melodio,
kiu kunprenas min en mian junon.

*Albordiĝo. Duoncirkla
horizonto el spektemo
nin alsaltas.
Vi veneras lumtulipe.
En la gorgo miaj versoj
skrape svarmas.*

Kantu, Ana.
Kantu, ke mia regno iĝu vero.
Kantu, ke miaj vortoj
en via buŝo fine
purigu sin je l' peko de l' ekzisto.
Transbrodu mian voĉon vialange.
Inspiru la poemon,
kiu trasagu l' sinon de la sentoj.
Kaj venku plu la nokton oleandran.

Miguel Fernández



ALIĜILO

por la 19-a Andaluzia Kongreso Jerez
de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015

Plenumu tiun ĉi aliĝilon, kaj komuniku ĝin al la asocio AEU en Malago. Oni povas sendi ĝin (aŭ simple la datenojn) per e-mesaĝo al andaluciaesperanto@gmail.com aŭ al fizika adreso de la asocio: Asociación Andaluza de Esperanto AEU Calle Anfora, 6-5-D 29013-Málaga (Hispanio)

Puedes descargar este FORMULARIO, rellenarlo y enviarlo a la asociación AEU en Málaga.

PERSONA NOMO (Nombre) FAMILIA(J) NOMO(J) (Apellidos)
 ADRESO (Calle)
 URBO (Ciudad) (.....) LANDO (País)
 RETADRESO (Correo electrónico)
 TELEFONNUMERO(J) (Teléfono)
 NASKIĜDATO (Fecha nacimiento) (nedevice, nur por statistiko aŭ rabato)
 DATO DE PAGO (Fecha de pago) MANIERO DE PAGO (Manera de pago)
 KOTIZO
 ALIAJ
 DONACO
 SUMO

KOTIZOJ	Aliĝo ĝis la 30a de aprilo	Ĝis la 30a de septembro	Post la 30a de septembro.	Surloke
	10 €	15 €	20 €	25 €

Paga en la cuenta siguiente indicando el texto "Kongreso" y tu nombre en la cuenta: 2031 0225 54 0100187657 Caja General de Ahorros de Granada (si estás en España)

Por pagi eksterlande bv. uzi jenan kodon: IBAN ES80 0487 3225 1420 0000 6979 //SWIFT/BIC: GBMNESMMXXX

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

<https://andaluciaesperanto.wordpress.com/> <http://andaluciaesperanto.blogspot.com.es/>